

sub la suda kruco ★
marto 2015

ESPERANTO



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIIOJ

Volumo 23 [1] numero 118 marto 2015

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktoroj: David Ryan, Joanne Johns

Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK

G.P.O. Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au

NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-a de majo 2015

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonajo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2015 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380.

SUR LA KOVRILO Madelene Carney, la plej juna partoprenanto de la 2015a kongreso de Esperanto kaj somerkursaro en Melburno.




5. Esperantistoj de la jaro 2014



8. Art-aprezado por ĉiuj



14. Roger Springer




16. Neniam estas tro malfrue



18. Geokaŝado tra la mondo



22. Kvin demandoj



23. Mia unua kongreso



28. Keppel Earl Enderby 1926-2015

marto, du mil dekkvin

Antaŭparolo

DE DAVID RYAN (WELLINGTON)

En ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* (ESK) aperas informoj pri kelkaj el niaj legantoj. Unue, ni gratulas al Joanne Johns kaj Richard Delamore, 'Esperantistoj de la Jaro 2014' en Aŭstralio. Gratulon al vi kaj koran dankon pro via laboro por nia lingvo! Ankaŭ aperas informoj pri kelkaj aliaj membroj kiujn oni intervjuis dum la kongreso/somerkursaro en Melburno. Mi gratulas al Marja Nielsen kiu, leginte mian kontribuon en la lasta numero de ESK, same verkis dulingvan artikoleon pri siaj spertoj per Esperanto. Mi promesis premion al kontribuonto - botelon de nov-zelanda vino. Marja - mi devos viziti vin en Adelajdo kaj mi portos vian botelon.

En decembro/januaro mi iris kun mia familio en ferioj al diversaj landoj en Eŭropo. Nia lasta kaj plej interesa vizitloko estis Berlino, ĉefurbo de Germanio. Mi interesiĝas pri eŭropa historio kaj, por mi, vizito al Berlino estis ege informriĉa. Tie mi staris en urbo kiu antaŭ nur iom pli ol 25 jaroj estis dividita per granda muro. Dum nia vizito mi povis tuŝi parton de tiu eksa muro.

Estas interesa fakto ke la muro falis pro malgranda eraro. La registaro de Orienta Germanio decidis doni iom da libereco al orientberlinanoj kiuj - en la estonteco kaj kun oficiala permeso - povos viziti la okcidentan parton. Oni petis ke registara funkciulo anoncu tion dum kunveno kun gazetaraj reprezentantoj. Oni demandis al li 'kiam?'. Li ne sciis kiel respondi; tial, li diris 'tuj'. Tio estis eraro. Tamen, orientberlinanoj aŭdis pri tio kaj kuris amase al la transirpunktoj. La tieaj policistoj kaj soldatoj ne sciis kion fari antaŭ tiel granda homamaso. Ili devis malfermi la pordojn kaj jen komenciĝis

la fluo el orienta Berlino kaj la detruo de la muro.

Mi ĉiam memoras junularan kongreson kiun mi ĉeestis en norda (okcidenta) Germanio en decembro 1989 nur kelkajn semajnojn post la falo de la muro en novembro 1989. Tiun kongreson ĉeestis 600 junaj esperantistoj, plejparte el eŭropaj landoj, kaj venis kelkaj centoj el orienteŭropaj landoj kiel Hungario, Orienta Germanio, Jugoslavio ktp. Mi rigardis ilin kaj mi min demandis 'Nun ili vizitas por unua fojo ne-komunistan landon. Kion ili opinias? Kio estos nova, stranga, nekutima por ili?'. Dum la epoko de la malvarma milito estis nur kelkaj metroj inter la orienta kaj okcidenta partoj de Berlino - sed ege granda distanco inter la du sistemoj, kapitalismo kaj komunismo. Berlino estas tre interesa urbo kaj mi rekomendas viziton, ne nur por lerni pri ĝia historio sed ankaŭ por viziti muzeojn, parkojn, belajn konstruaĵojn ktp. Certe post Berlino, vizitu ankaŭ Vienon. Vieno estas tre bela urbo kaj tie vi trovos Esperanto-muzeon en la urbcentro kie vi povos aŭskulti sonbendon en kiu parolas Zamenhof mem.



Antaŭa muro de Berlin - je la alia flanko estas la eksa malbela 'orienta' parto de la urbo

Esperantistoj de la Jaro

INTERVJUIS SANDOR HORVATH (ADELAJDO)



Joanne Johns, Esperantistino de la jaro 2014

Diru kelkajn vortojn pri vi.

Mia nomo estas Joanne Johns. Mi naskiĝis en Gosford. Post ses jaroj mia familio translokiĝis al Port Macquarie kie mi plenkreskis. Post miaj lernejoj jaroj mi translokiĝis al Brisbano por trovi laboron, trovis edzon, kaj poste ni venis al Melburno.

Kiel vi malkovris kaj kial kaj kiel vi lernis Esperanton?

Mi tre ŝatis la britan televidserion "Red Dwarf" (Ruĝa Nano). Tiu programo enhavas Esperanton, sed tiam mi ne vere pensis pri kio ĝi estas. Post multaj jaroj mi vidis artikolon kun la vorto "Esperanto" en ĝi, kaj mi decidis esplori. Mi eltrovis kio Esperanto estas, kaj ŝategis la ideon, kaj mi komencis lerni ĝin per la reto kaj poste dum la kongreso en 2014 en Kanbero.

Mi rimarkis vian grandegan progreson ekde januaro 2014. Kiamaniere vi progresis tiel rapide?

Troveblas multaj rimedoj en la reto. Mi uzis ĉiujn rimedojn, kiujn mi trovis: lernu.net, Kurso de Esperanto, Memrise,

Anki ktp. Mi ĉeestis la kunvenojn de la melburna klubo ĉiun lundon. Mi fondis alian grupon kaj tie mi mem instruis al komencantoj. Tio ankaŭ helpis min plibonigi mian Esperanton.

Diru kelkajn vortojn pri tiu grupo.

La kunvenoj de la melburna klubo estas bonegaj, sed iomete tro seriozaj kaj intensaj... iomete timigaj por veraj komencantoj. Ankaŭ oni kunvenas en lokoj kie neniu preterpasas. Mi volis esti en publika loko. Mi kreis etan "meetup.com"-grupon kiu kunvenas dimanĉe je la 15:00-a en kafejo en Federation Square. Pere de tio kelkaj junuloj komencis lerni la lingvon.

Kio donis/as al vi la energion fari tiom multe por Esperanto?

Mia profesia fono estas desegnado. Kiam mi vidas ion kio ne plaĉas al miaj okuloj, mi volas plibonigi ĝin. Kaj por ellerni la lingvon, mi devas uzadi ĝin!

Ŝajnas ke vi ankaŭ konvinkis vian edzon, Peter, lerni la lingvon, ĉu?

Fakte, sen li mi ne estus ĉi tie. Mi nur mem studis Esperanton; mi ne parolis kun iu ajn. Mi vidis informon pri la kongreso en Kanbero kaj pensis ke estus bona ideo ĉeesti, sed mi iomete timis. Peter vere kuraĝigis min partopreni. Do, estis pro li ke mi komencis mian "duan" Esperanto-karieron. Post tio, Peter ankaŭ decidis lerni la lingvon.

Kion vi ŝatus fari pere de Esperanto dum la venontaj jaroj?

Kompreneble vojaĝi. Sed mi ankaŭ ŝatus allogi pli da junuloj por lerni Esperanton. La lingvo bezonas junulojn por havi estontecon.

Multajn dankojn. Kaj refoje AEA gratulas vin pro tio ke vi estis unu el la du aŭstraliaj Esperantistoj de la Jaro en 2014.



Richard Delamore, Esperantisto de la jaro
2014

Diru kelkajn vortojn pri vi.

Mia nomo estas Richard Delamore, sed en nia movado mi estas simple “Riĉardo”. Mi estas 27-jarojn aĝa aktoro, film-produktoro, kaj blogisto. En Esperantujo, mi precipe prilaboras la interretan televid-kanalon “Esperanto-TV”. Ekstere mi ĉefe prilaboras la retejon www.actinguustralia.com.au (kiun oni ankaŭ povas tralegi Esperante).

Kiel vi malkovris kaj kial kaj kiel vi lernis Esperanton?

Mi unue esperantiĝis antaŭ kvin jaroj kiam mi hazarde trovis artikolon pri internaciaj lingvoj en Vikipedio. Tiu artikolo raportis ke ekzistas denaskuloj, kaj tio interesigis min scii pli. Post unu-horan kurson ĉe lernu.net, mi konsciis ke nian karan lingvon mi devas ellerni. Do, mi daŭre studis la lingvon dum tri monatoj ĝis kiam mi ĉeestis mian unuan kunvenon. Ĉiuj partoprenantoj estis

tre afablaj kun mi, do mi pli vigle volis scipovi la lingvon. Antaŭ ol komenci lerni Esperanton, mi neniam kredis ke mi povos regi fremdan lingvon.

Kion vi faris pere de Esperanto ĝis nun?

Mi ne scias kie komenci! Mi supozas ke mia plej granda uzo de Esperanto estas la kreado de Esperanto-TV, www.esperantotv.net. Ĉiutage mi devas uzi Esperanton por tiu kanalo. Krom tio, mi ankaŭ influis kelkajn reĝisorojn por uzi Esperanton en iliaj filmoj, kaj mi vojaĝis en Eŭropo per ĝi.

Fakte, mi estas preskaŭ profesia Esperantisto—ne laŭ pago, sed laŭ la daŭra uzo de la lingvo—kaj la plejparto de la Sidneja filmindustrio konas min kiel la “Esperantisto”-n. Kiam mi renkontas novan reĝisoron, tiu tre ofte diras “Ho jes, mi aŭdis pri vi de tiu kaj tiu... vi estas tiu esperantisa produktoro”.

Esperanto-TV – kial kaj kiel vi komencis?

Mi ne memoras kie, sed ie mi legis la jenan citon “Por ke lingvo supervivu en la moderna mondo, ĝi devas havi fortajn literaturajn kaj filmajn industriojn”.

Mi estas kaj profesia filmisto, kaj amanto de nia lingvo. Do, laŭ mi, estas nature ke ni devas havi nian propran film-industrion. Do mi ĉiam estis malfermita al la ideo...

La vera komenco de Esperanto-TV, tamen, okazis dum la Zamenhofa Tago de 2013. Tiam, nova televida entrepreno, iStream Studios, decidis proponi al Marina (loka subtenanto de Esperanto) ke ŝi trovu esperantistojn por starigi Esperant-lingvan kanalon. La ideo ne plaĉis al kelkaj samideanoj, sed preskaŭ tuj interesiĝis pri la propono Dmitry.

Tamen estis problemo; Marina kaj li neniam prilaboris filmojn kaj televidajn elsendojn kaj do ne sciis kiel aranĝi la aferon. Dum tiu tempo, la loka movado estis iom stagna, kaj pro tio, verdire, mi kabeis iel. Almenaŭ ĝis kiam mi ricevis tiun revivigan telefon-vokon de Dmitry pri ilia propono.

Mi sciis ke televido ne estas unuhoma tasko, ke ĝi postulas skipon de homoj. Do, mi tuj komencis serĉi kunulojn, kiuj jam donis sian vivon iel al Esperanto kaj filmado. Iom poste, mi trovis la esperantiston Roberto Poort el Usono. Li prilaboris/as film- kaj radi- retejon kaj mi kontaktis lin. Poste mi trovis la ĵurnaliston Antonio Codazzi el Italio, kaj ili entuziasme kontaktis multajn aliajn esperantistojn kaj ni ĉiuj komencis kunlabori.

Esperanto TV - la nuna situacio kaj planoj?

Esperanto-TV estas en bona situacio; ni gajnis du gravajn sponsorojn dum la pasinta jaro: la Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj la Hodler-Institucio. Tio signifas ke niaj bazaj financoj estas kovritaj dum unu jaro almenaŭ. Nun ni prilaboras du gravajn vojojn:

Restrukturado: Ni devas leĝe restrukturi la kanalon por kreski kiel oficiale registrita kanalo. Tio provizos nin per eblaj registaraj subvencioj kaj leĝaj protektoj.

Financoj: Ni devas prilabori la diskonigon de "54 Tagojn"* por alporti necesajn financojn al la kanalo. Ankaŭ ni baldaŭ komencos starigi skipeton por produkti nian unuan scienc-fikcian filmon 15 minutojn longan. La skripto jam estas verkita de Antonio Codazzi. Ni nun volas allogi la premiitan reĝisoron Tim Lea al la projekto.

Kion donis/as al vi la energion fari tiom multe por Esperanto?

La diro atribuita al Marc Anthony taŭgas ĉi tie: "Se vi amas vian laboron, vi neniam laboras tagon dum via vivo". Filmoj kaj Esperanto estas miaj pasioj. Do, mi ne bezonas tiom multe da energio por fari ilin.

Krom Esperanto-TV, kion vi ŝatus fari pere de Esperanto dum la venontaj jaroj?

Mi timas diri miajn planojn ĉar, se miaj planoj ne portos fruktojn, tiam oni kulpigos min pri mensogoj. Tamen, mi havas revon por starigi longdaŭran filmon per Esperanto kaj la angla pri la frua epoko de Esperanto. Mi kreus tiun filmon por festi nian historion kaj por allogi junulojn al la movado.

* Vidu Esperanto-TV ĉe:
esperantotv.net



Art-aprezado por ĉiuj

DE JONATHAN COOPER (GOSFORD)

I. Mitoj kaj duonveroj pri arto

Kio estas art-rigardado por vi? Ĉu ĝi estas ĝua, plezura kaj luda? Aŭ konfuziga, timiga kaj eĉ koleriga (precipe pri moderna kaj nuntempa arto)? Kial oni ne povas simple aprezi (tio estas, kompreni kaj ĝui) arton? Mi kredas ke ekzistas kelkaj obstakloj. Tiuj estas mitoj kaj duonveroj pri arto. Duonveroj fakte estas pli tiklaj ol malveroj, ĉar oni ne povas simple malpruvi ilin. Ili havas iom da vero, sed ne la tuton. Jen kelkaj:

“Art-aprezado malfacilas, kaj postulas jarojn da studado.”

La bona novaĵo estas ke ekzerci art-aprezadon dum tempo ĉiam donas rekompencan. Sed diveni kio estas la sola, plej bona ago, kion vi povus fari por pliiĝi vian nivelon de art-aprezo? Estas simple montri al vi arton! Kaj ĝin daŭre fari, kun menso tiel malferma kaj nejuĝema kiel eble.

“Povi paroli pri arto ricevigis vin en la ‘ĝustaj’ rondoj.”

Tio dependas pri tio kion vi intencas per “ĝustaj”. Ĉu ne estas malĝoje ke arto estas uzata kiel speco de socia konkurso? Kaj bedaŭrinde, tiu fenomeno estas memdaŭriga.

“Ĉio estas subjektiva, ĉu ne?”

Alia maniero por diri tion estas “Ne ekzistas bona aŭ malbona arto” aŭ “Mi ne scias multe pri arto, sed mi scias kion mi ŝatas.”

Ke arto estas subjektiva parte veras, do tio estas duonvero, kaj la allogo de tio estas ne-negebla. Tamen, estas citaĵo, kio laŭ mi respondas plej bone ESK | paĝo 8 | 118 | marto 2015

al ĝi:

“Ne estas malbonaj kialoj por ŝati pentraĵon; estas [nur] malbonaj kialoj por ne ŝati pentraĵon.” – EH Gombrich, *La Rakonto de Arto*.

Do, ne juĝu tro frue. Ne ‘fermu la pordon’.

“Arto devus esti bela.”



1. Francisco Goya *La tria de majo*, 1808, 1814 Prado, Madrid

Tio dependas de tio kion oni intencas per “bela”. Ekzemple, konsideru la pentraĵon de Goya, *La tria de majo*, 1808 (bildo 1). Eble ni povus priskribi ĉi tiun efikon kiel “feroca beleco”? Tiu pentraĵo indikas disiĝon inter temo kaj stilo: la temo ne estas bela, kompreneble sed, laŭ multaj, la stilo estas ja bela. Ni rigardu artaĵon kiun oni certe intencis esti bela per kaj temo kaj stilo. Eĉ la ‘titolo’ diras tiel: *Pozitiva, bela, artaĵo, arto, arboj, luno, tero* (bildo 2). Alivorte, ĝi estas vendebla, fonbilda arto por komputiloj. Do, ĉu tio estas pli “bela” ol la pentraĵo de Goya? Oni eble priskribus la “belecon” de ĝi kiel kliŝa, tro dolĉa, recepta, malplena, kaj



2. Positive beautiful artwork art trees moon earth HD wallpaper (#13149)
de hd4desktop.com

sen enhavo.

“Arto devus montri lertecon.”

Tiun duonveron oni ofte uzas kiel kialon por ne pli multe partopreni en arto. Ni ŝanĝu la demandon, por nun, de “Ĉu arto bezonas lertecon?” al “Ĉu lerteco estas sufiĉa por bona arto?”. Rigardu bildon 2 denove. La lerteco de la artisto estas nedisputata, sed ĉu tiu fakto, sole, atestas ke la pentraĵo ja estas bona?

“Arto ne estas por ĉiuj.”

Alia maniero por diri tion estas “Mi ne estas artema.” La respondo al tiu mito estas esence la sama kiel al la unua. Iu ajn povas esti art-spertulo. Oni nur bezonas tempon kaj malferman menson.

“La artisto estas la sola vera spertulo.”

Tio eble veras, dum la artisto laboras je artaĵo. Sed, tuj post kiam artaĵo finiĝas kaj forlasas la atelieron, ĝi apartenas al la mondo. Ekzemple, la aŭstralia

artisto Jeffrey Smart asertis multfoje pri siaj pentraĵoj ke ili estas kvazaŭ “abstraktaĵoj kun temoj”. Alivorte, kvankam li ofte pentris homojn en strangaj urbaj scenoj, kun malhelaj ĉieloj kaj fortaj ombroj, li insistis ke la pentraĵoj ĉiam temas nur pri formoj kaj koloroj, ktp. Tamen, multaj homoj (inkluzive de art-historiistoj) ne tute kredas lin.

Kompreneble, por iuj artaĵoj, ni ne havas deklarojn de la artisto. Anstataŭe, ni havas “historian kuntekston”.

“Por sufiĉe aprezi arton, oni devas scii la historian kuntekston.”

Kunteksto fakte eble prenas nin for de prezado de artaĵo. Ekzemple, ĉu ni povas nun rigardi la pentraĵojn de van Gogh sen pensi pri la torturita mensa vivo de la artisto?

Antaŭ multe da jaroj, mi estis en la Muzeo de Moderna Arto en Nov-Jorko. Mi legis sur signo apud la eniro: “Parolo pri la arto de Marcel

Duchamp – komenciĝos en... galerio... je la dua." La arto de Duchamp tre interesas min, do mi iris tien kaj atendis. La parolado estis komencota apud malfrua pentraĵo de Duchamp. Je la dua, ĉiĉerono alvenis, enkondukis sin kaj komencis paroli. Dum minuto, kvin minutoj, dek minutoj, li parolis pri la vivo de Duchamp, pri la artmovado "dadaismo", sed li nek rigardis la pentraĵon malantaŭ si, nek montris ĝin. Mi ne estis tie por aŭskulti faktojn, kiujn mi povas legi el libroj. Mi estis tie por vidi realajn artaĵojn kaj lerni pri ili.

Grava principo pri art-aprezado estas ke ekzistas kaj interna kaj ekstera informoj; oni devas serĉi unue tiom da interna informo kiom eble.

"Mona valoro montras (aŭ devus montri) artan valoron."

Estas simpla ekvacio: **Mona valoro = peto dividita per provizo.** Se peto pligrandiĝas, aŭ provizo malpligrandiĝas, mona valoro pligrandiĝas. Tiu principo aplikas por domoj, oro, glumarkoj, kaj ankaŭ por artaĵoj.

Fakte, eblas ruze manipuli la monan valoron de artaĵoj organizante ke iu alia aĉetu artaĵojn faritajn de iu ne bone konata, mortinta artisto, por iomete pli kaj pli altaj prezoj ĉe ĉiu vendo. La aĉetontoj eknotas. La provizo de tiaj artaĵoj estas konstanta (kaj, tial, limigita). Do, la prezo en "malferma" merkato plialtiĝos.

Do, estas klare ke mona valoro kaj arta valoro estas du apartaj aferoj.

"Arto havas unu difinon"

Ezkemple, "Arto estas persona esprimo."

Kio estas arto? Tio dependas de la

kialo por la ekzisto de artaĵo. Diversaj artaĵoj havas diversajn kialojn laŭ tri ĉefaj celoj: **figuri, esprimi kaj krei.**

II. Kiel ni povas aprezi artaĵon?

Plej multaj homoj rapide ekrigardas kaj juĝas, kaj poste pravigas sian juĝon per siaj emociaj reagoj, kaj poste, eble rigard(et)as plu. La problemoj pri tiu metodo estas ke tiel oni fermus la pordon tro frue, la pordon al novaj spertoj.

Do, anstataŭe, ni devus unue...

- **rigardi**, atente kaj nejuĝeme, kaj poste, ĉar ni havos nenion pravigendan, ni povos...

- **reagi kaj rilati**, kaj poste, se ni volos, ni povos...

- **esti kritikaj.**

Do, ni ekzercu nian art-aprezadon:

1. Rigardu atente

Jen kelkaj ekzemplaj agadoj por helpi vin ekzerci vian lertecon rigardi.



3. Kvar formoj en *Instrumento blua* de Margaret Preston



4. Michel Keck *Between bad and worse*
(Inter malbona kaj pli malbona) (2009)
Kolekto de la artisto

Se vi volas fari tiujn efektivajn agadojn, rigardu la pentraĵon *Implement blue* (Instrumento blua) de Margaret Preston en la reto: bit.ly/implementblue (aŭ www.artgallery.nsw.gov.au/collection/works/OA7.1960/). Alie, faru similajn agadojn por aliaj artaĵoj.

- Trovu aĵojn aŭ ecojn, kies unua litero estas “S”. Trovu aĵojn aŭ ecojn, kies unua litero estas “T”.

- Trovu la kvar formojn en bildo 3 en la pentraĵo. (Ili eble estas malfacile troveblaj ĉar ekzistas du tipoj de vido: traviva vido – kiun ni uzas por rekoni, kaj ne hazarde frapi, objektojn – kaj **estetika vido** – tio estas vido pro plezuro. Kutime, ne necesas al ni vidi ombrojn aŭ la formojn de spacoj inter objektoj. Tamen, per estetika vido ni povas vidi sendepende de tio, kion ni scias.)

- De kie venas la lumo?

- Trovu ion kio montras ke la artisto valoris komponadon pli ol realismon. (La solvo estas ĉe paĝo 12.)

2. Reagu kaj rilatu

Alivorte: Faru personan konekton. Se vi tuj ŝatas artaĵon, aparte la temon,

eble estas facile, sed ofte ne. Kutima tekniko kiun art-instruistoj kaj muzeo-ĉiĉeronoj uzas estas demandi “Kion ĝi sentigas al vi?”. Tamen, ĉu tio vere helpas? Kiel ni respondus? “Feliĉa”? “Malfeliĉa”? Arto havas pli da nuancoj de sento ol tio.

Jen kelkaj ekzemplaj agadoj por helpi vin ekzerci vian lertecon por reagi kaj rilati. Se vi volas fari tiujn efektivajn agadojn, rigardu la pentraĵon *Five bells* (Kvin sonoriloj) de John Olsen en la reto: bit.ly/5bells (aŭ www.artgallery.nsw.gov.au/collection/works/133.1999/). Alie, faru similajn agadojn por aliaj artaĵoj.

- Imagu ke vi promenas tra la pentraĵo per nudaj piedoj. Kion vi sentas pro tio? Ĉu la pentraĵo estas malmola, akra kaj krusta, aŭ mola, sponga, kaj ŝlima?

- Imagu ke la pentraĵo estas homo. Kio estas lia aŭ ŝia plej ŝatata sporto? Volanludo? Teniso? Glitŝtonludo? Futbalo? Luktado? Io alia?

- Imagu ke ĝi volas eskapi el la galerio dum la nokto. Kiel ĝi eskapus? Silente kaj ŝtelire? Aŭ subite kaj bruege?

- Kia besto ĝi estus?

- Kia estus la vetera prognozo en la pentraĵo?

- Se vi povus manĝi ĝin, kiel ĝi gustus? Kiel glaciaĵo? Pico? Miksopoto? Lukumo? Kapsiketa polpo? Io alia?

- Kun kia muziko ĝi estas kongrua?

3. Estu kritika

(Tamen, ne estas urĝo por tio!)

Estas tente diri “Mi konas malbonan arton kiam mi vidas ĝin.” Tamen, problemoj venas kiam ni ne havas kriteriojn. Ni klopodu kune taksi artaĵon.

Vidu la pentraĵon en bildo 4. Ni ekzamenu ĝin laŭ la tri ĉefaj celoj:

figuri, esprimi, kaj krei.

• Ĉu la artisto celis figuri parton de la reala mondo? Ne.

• Ĉu la artisto celis esprimi sentojn? Eble, sed kiajn sentojn? Estas tre malfacile diri.

• Ĉu la artisto celis krei plaĉan komponaĵon? Supozeble.

La du flankoj de komponado estas intereso (por ne tedi la rigardanton) kaj unueco (por ne konfuzi la rigardanton).

Ĉu la pentraĵo havas intereson? Jes, ja. Ĝi havas multajn diversajn kolorojn, formojn, markojn ktp. Sed, bedaŭrinde, ĝi ne havas multe da unueco – ĝi aspektas kiel tri aŭ kvar pentraĵoj kungluigitaj.

Jen alia ekzemplo, ne-abstrakta (bildo 5). Denove, ni taksu la artaĵon laŭ la tri celoj.

• Ĉu la artisto celis figuri? Jes.

• Ĉu la artisto celis esprimi? Jes, verŝajne sentojn de vivĝojo.

• Ĉu la artisto celis krei? Jes.

Ĉu la pentraĵo montras bone parton de la reala mondo? Nu, ni rekonas la objektojn, sed notu la linian perspektivon: la malapera punkto estas sub la horizonto!

Ĉu la artisto kreis unuecon? Plaĉan komponaĵon? Eble la bluverda akvo en la maldekstra flanko ne rilatas sufiĉe kun la cetero de la pentraĵo.

Kiel bone la pentraĵo esprimas senton? Ni supozas ke la artisto celis esprimi la vivĝojon de tago apud la maro, sed kion vi opinias pri la granda ŝtona muro? Ĉu vi pensas ke ĝi eble kontraŭas la malpezan, aeran senton de la temo?

Fojfoje estas pli facile taksi kiam oni havas rilatan artaĵon por kompari. Vidu la du pentraĵojn de floroj (bildoj ESK | paĝo 12 | 118 | marto 2015



5. Ethel Carrick *La marée haute à Saint-Malo* (ĉ. 1911-12) AGNSW. Aĉetita per mono donita de la Fonduso Gleeson O'Keefe 2009

6 kaj 7).

Ĉu vi opinias ke la dekstra pentraĵo estas pli konvinka? Notu kiel la ombroj mankas sub la prunoj en la maldekstra pentraĵo!

Kiu pentraĵo havas pli bonan komponadon? Eble la maldekstra pentristo ne povis decidi kion fari pri la supra, dekstra angulo.

Resumo

• Viaj personaj reagoj havas valoron.

• Artaĵoj havas informojn kaj internajn kaj eksterajn. Serĉu unue tiom multe da interna informo kiom eble.

• La valoro de viaj personaj reagoj, kaj la kapablo trovi internan informon, plibonigas memfidon.

• Estetika vido (tio kion arto nutras) ne estas la sama kiel traviva vido.

• Estetika vido estas vidi sendepende de tio kion vi scias.



Maldekstre: 6. William Buelow Gould *Floroj kaj fruktoj* 1849 AGNSW
 Dekstre: 7. Henri Fantin-Latour *Floroj kaj fruktoj* 1866 AGNSW

• Por aprezi artaĵon, rigardu atente kaj nejuĝeme, poste reagu kaj rilatu kaj, fine, estu kritika. Ne transsaltu paŝon. Hasto ne necesas por la paŝo ‘estu kritika’.

- Donu al arto tempon.
- Ne forgesu ‘danci’ (rigardu bildon 8)!

Solvoj

“S”: spegulaj surfacoj, strioj, subtasoj, suker-kubo. “T”: tablo, tuko, taso, telereto.

• La formoj estas (de la supra, maldekstra angulo):

– Blanka spaco inter la mezaj du objektoj kaj iliaj ombroj, kaj la dekstraj du objektoj kaj iliaj ombroj.

– Unu spegulaĵo sur la kruĉo.

– Dekstra duono de la ombro kaŭzita de la glaso kun la citrono.

– Videbla parto de la ombro kaŭzita de la maldekstra taso kaj subtasoj.

• La lumo venis de lampo antaŭ la tablo.

• La ombro de la kruĉo ŝajnas

kuŝi sub la taso kaj subtasoj antaŭ ĝi; kaj la strioj malantaŭ la kruĉo estas nekontinuaĵoj (imagu ke la kruĉo malaperis). Tiuj du faktoj montras ke la artisto valoris komponadon pli ol realismon.



8. Juna knabino pozanta antaŭ pentraĵo. Fotisto Kirsty Kelly. Pli da informo (en la angla): bit.ly/dancetoart (or - <http://bolstablog.wordpress.com/2013/01/17/art-important/>)

Roger Springer

INTERVJUIS SANDOR HORVATH (ADELAJDO)

Ekde 2011 – ĉiun semajnon – Roger Springer sendas al centoj da homoj sian novaĵleteron “AE” (Aŭstraliaj Esperantistoj). ESK parolis kun li.

Mi loĝas en Manly, antaŭurbo de Sidnejo. Laŭ mi, tiu estas bona loko. Ni havas milojn da vizitantoj ĉiutage.

Mi havas fiŝujojn en la antaŭĝardeno kaj mi povas vidi miajn 80 cm longajn fiŝojn kaj vizitantojn sur la granda ekrano de mia televido pere de ekstera kamerao.

Kial vi iĝis esperantisto?

Bona demando. Fakte, mi estis esperantisto dum mia tuta vivo, sed mi eksciis pri Esperanto nur kiam mi havis 24 jarojn. Mi ofte parolis pri mia ideo ke devas esti komuna lingvo ĝis iu amiko atentigis min ke mi estas jam tro malfrua kaj tiu lingvo jam ekzistas. Se vi vere kredas je io, vi devas fari ĝin. Do, mi lernis la lingvon.

Kompreneble, Esperanto ne estis mia sola ŝatokupo dum multaj jaroj. Mi ankaŭ ludis la sakŝalmon kaj, kiam estis konflikto inter ĝi kaj Esperanto, mia sakŝalmludado estis pli grava.

Post mia emeritiĝo mi ĉesis ludi

la sakŝalmon kaj mi dediĉis preskaŭ mian tutan vivon al Esperanto.

Kial vi komencis novaĵleteron “Aŭstraliaj Esperantistoj”?

Ivan kaj Max alparolis min pri la problemoj ene de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj proponis ke ni fondu novan asocion. Mi opiniis ke tiu estus stulta propono, ĉar AEA havas multe da mono. Tute nova asocio ne havus monon.

Mi pensis ke regula novaĵletero helpus la situacion kaj mi komencis fari tion.

Kiuj estis la malfacilaĵoj je la komenco?

Je la komenco, Ivan helpis min. Kiam mi pensis ke iu kontribuo estas tro konflikta, mi demandis al li pri tio. Mi estis tre malfeliĉa kiam li mortis. Vera Payne el Perto sendis mesaĝon kaj atentigis min ke la lingva kvalito en la novaĵletero estas ege malbona. Kial iu ne provlegis ĝin? Mi konsentis

Roger Springer rigardante artaĵon ĉe la nacia galerio de Viktorio dum la 2015a kongreso de Esperanto kaj somerkursaro en Melburno.





Ekzemploj de la novaĵletero *Aŭstraliaj Esperantistoj*

kaj donis tiun laboron al Nicole. Ŝi estas bona lingvisto. Ŝi havas tre fortajn ideojn kun kiuj mi ne ĉiam konsentas, sed ŝi estas kaj restas bona provlegantino kaj amikino, malgraŭ niaj diferencoj.

Kio estas la celo de “Aŭstraliaj Esperantistoj”?

La celo estis kaj estas informi la esperantistojn en Aŭstralio ke ili ne estas solaj. Ili estas parto de granda familio. Pro tio mi nomis ĝin “Aŭstraliaj Esperantistoj” (AE).

Tamen, bedaŭrinde, estas kelkaj kluboj kiuj neniam sendas informojn. Mi ne ricevas novaĵon el Brisbano, Kanbero, Hobarto, kaj Perto. Mi iom ĉagreniĝas pro tio, sed tio estas ilia perdo, ĉar en la estonteco kiam oni skribas la historion de Esperanto en Aŭstralio, la verkistoj devos konsulti mian novaĵleteron. En la estonteco tiuj kluboj simple ne ekzistos.

Ne devas esti grandaj artikoloj. Tre simpla artikolo sufiĉas. Ekzemple, ofte mi raportas pri la klubo en Manlio kie ni havis kunvenon kaj venis tri homoj. Fino kaj punkto. Tio estas intenco ĉar mi volas montri al aliaj ke ne estas multa laboro.

Kiajn komentojn vi ricevas de la leganto?

Mi regule ricevas dankmesaĝojn, kompreneble atentigojn pri diversaj lingvaj eraroj, aŭ ili esprimas malkonsenton pri io. Tio estas bona ĉar ĝi signifas ke ili legis la novaĵleteron.

Kiom da homoj ricevas nun la novaĵleteron?

260.

Kion vi ŝatus vidi dum venontaj jaroj kun AE?

Mi tre ŝatus ke ĉiu klubo kaj asocio tra Aŭstralio sendu al mi almenaŭ minimuman informon pri sia pasinta kaj venonta agado: kunvenoj, vizitantoj, projektoj ktp.

Tiel, iu ajn povus kontroli AE kaj eltrovi ke la Hobarta grupo havos interesan kunvenon je venonta ĵaŭdo. Tio sonas interesa. Mi telefonos al ili ...

Kio donas al vi la energion kaj forton daŭrigi pri AE?

Mi estas tia homo. Mi tre sukcesis en mia financa kaj profesia vivo kaj ... en mia juneco mi estis parto de velboata klubo kaj mi tre bone memoras kiam la tiama prezidanto anoncis “Mi konscias ke multaj el vi voĉdonos kontraŭ mi. Tio estas pro la fakto ke mi faras multon. Kaj por esti kritikata vi devas fari multon. Kiam vi faras nenion, vi ne povas esti kritikata.”

Tiuj vortoj restis kun mi. Kompreneble, mi ne ŝatas kritikon, sed mi malŝatas eĉ pli fari nenion.

Ni dankas al Roger pro lia laboro kun AE. Tiu estas grava informilo por esperantistoj en Aŭstralio kaj ankaŭ en Nov-Zelando. Ĉiu numero de AE troviĝas sur la retejo de AEA (aea.esperanto.org.au). Por aldonigi vian nomon al la elsenda listo, sendu mesaĝon al rogerspringer@tpg.com.au.

Jen alia dulingva artikolo pri niaj spertoj kiel esperantistoj. Ni serĉas volontulon por prezenti sin por la venonta numero de ESK.

Here is another bi-lingual article about our experiences as Esperantists. We are searching for volunteers to present themselves for the next edition of ESK.

Neniam estas tro malfrue

MARJA NIELSEN (ADELAJDO)

Mi interesiĝis pri Esperanto ekde 1950 kiam mi trovis la Esperanto-vortaron de mia patro. En tiu tempo mi translokiĝis el Nederlando al Indonezio. Mia patrino devis decidi kiujn el niaj posedaĵoj ni bezonos en nia nova lando. Malbonŝance mi neniam pensis demandi al mia patro kial li havas tiun vortaron. Ni forgesis pri la vortaro.

Mia patro mortis en 2005.

En 2011 mi aŭdis alian lernanton en mia germana klaso paroli pri Esperanto kaj mi memoris la vortaron de mia patro kaj mia intereso komenciĝis. Mi aliĝis al la Esperanto-klaso de Paul Desailly, kiu loĝis tiutempe en Whyalla. Mi havis 71 jarojn.

Mi komencis serĉi pli da informo pri Esperanto.

Kiam mi ordigis la posedaĵojn de mia patro en 2011, mi trovis du poŝtkartojn kiuj estas adresitaj al mia patro, skribitaj pli malpli en 1932. Ili venis de socialistaj junuloj el Braŭnaŭ (la naskiĝloko de Hitler).

Mi nun tre bedaŭras ke mi neniam parolis kun mia patro pri tiuj du

It's never too late

MARJA NIELSEN (ADELAJDO)

I've been interested in Esperanto since 1950, when I found my father's Esperanto dictionary. It was the time when I moved from the Netherlands to Indonesia. My mother had to decide which of our possessions we would need in our new country. Unfortunately I never thought to ask my father why he had that dictionary. We forgot about the dictionary.

My father died in 2005.

In 2011 I heard another student in my German class speak about Esperanto and I remembered my father's dictionary, and my interest began. I joined the Esperanto class led by Paul Desailly, who lived in Whyalla at that time. I was 71 years old.

I started to search for more information about Esperanto.

When I tidied my father's possessions in 2011, I found two postcards which were addressed to my father, written in about 1932. They came from young socialists from Braunau (Hitler's birthplace).

I now very much regret that I never spoke with my father about those

poŝtkartoj el Aŭstrio kaj lernis iom pri lia Esperanto vivo.

Tiel mi komencis mian vojaĝon en Esperantolando. Vere, mi komencis tiun vojaĝon jam en 1950.

Nun mi jam partoprenis kelkajn aranĝojn, inkluzive la pasintan AEA kongreson/somerkursaron en Melburno en januaro 2015.

Mi nur esperas ke – dank' al Esperanto – la vivo de mia patro estis pli riĉa, same kiel la mia nun.

two postcards from Austria and never found out about his Esperanto life.

In that way I started my journey in the land of Esperanto. Truly, I started that journey already in 1950.

Now I have already participated in several events, including the last AEA conference and summer school in Melbourne in January 2015.

I only hope that - thanks to Esperanto - my father's life was richer, the same as mine is now.



La du poŝtkartoj

The two postcards



Marja Nielsen, ĉe la 2015a kongreso de Esperanto kaj somerkursaro en Melburno

Marja Nielsen, at the 2015 Esperanto conference and summerschool in Melbourne

Geokaŝado tra la mondo

DE JOANNE JOHNS (MELBURNO)

Kiam mi vojaĝas, plejparte mi preferas eviti la kutimajn lokojn kiujn turistoj vizitas. Ĝenerale mi trovas ke, kvankam la loko verŝajne iam havis ian ĉarmon aŭ signifon, la plejmulto de tio ruiniĝis per grandaj homamasoj aŭ komercoj ĉasantaj la turistan dolaron.

Mi iam fidis lokajn amikojn aŭ familianojn por montri al mi la pli kvietajn, pli specialajn lokojn - ĝis mi eltrovis geokaŝadon. Geokaŝado estas grandega, tramonda ludo de kaŝado kaj serĉado, organizata per centra retpaĝo. Iuj el la homoj kiuj ludas la ludon kaŝas kaŝaĵon - ujon

kiu enhavas registrolibron, kaj, se ĝi estas sufiĉe granda, kelkajn malmultekostajn objektojn por interŝanĝi (se vi volas - kutime, se infanoj ludas) - en bone kaŝita loko aŭ iam bone kamuflita kaŝaĵo en klara vido. Ofte la loko en kiu ili elektas kaŝi sian kaŝaĵon estas iu loko speciala por ili: aparte bela parko, ie kun belega vidaĵo kiu ne estas okupita de turistoj ktp.

La kaŝanto registras la kaŝaĵon en la geokaŝada retpaĝo, kune kun TLS*-koordinatoj montrantaj kie ĝi estas kaŝita kaj priskribo. La priskribo de la kaŝaĵo ofte ankaŭ

Bildo el geocaching.com kiu montras ke oni povas trovi kaŝaĵojn preskaŭ ĉie tra la mondo



enhavas detalojn pri la historio aŭ interesajn faktojn pri la loko - kvazaŭ oni havas personan ĉiĉeronon! La aliaj ludantoj, uzantaj TLS-on aŭ TLS-ebligitan poŝtelefonon, navigas al la koordinatoj kaj serĉas kaŝaĵon.

Tio sonas esti simpla sed estas kelkaj tre ruzaj geokaŝantoj kaj oni ofte ĉirkaŭiras demandante kie ĝi povas esti kaŝita. Se oni trovas la kaŝaĵon, oni subskribas la registrolibron, interŝanĝas objekton, se oni deziras, tiam remetas la kaŝaĵon kiel oni trovis ĝin, registras sian trovaĵon en la retpaĝo, kaj onia kalkulo de trovaĵoj pliiĝas per unu.

Estas ses ĉefaj specoj de kaŝaĵoj. Kun kutima kaŝaĵo, oni ricevas

koordinatojn, oni iras al la loko, kaj (espereble) trovas la kaŝaĵon. Oblaj kaŝaĵoj estas iomete pli aventuremaj - oni devas iri al la loko donita kaj poste trovi indikon per signo aŭ io simila (Kiom da benkoj estas? En kiu jaro la ŝipo subakviĝis?) kiu permesos la kalkulon de la koordinatoj de la kaŝaĵo - aŭ nur la venonta indiko!

Misteraj kaŝaĵoj ne donas la koordinatojn al la kaŝaĵo. Anstataŭe oni devas solvi enigmon por trovi la koordinatojn. Ĉi tiuj enigmoj varias el simplaj literaj interŝanĝaj cifroj aŭ simpla matematiko, al kompleksaj multpaŝaj enigmoj kiuj postulas scion de multaj lingvoj, koloraj

Tre bone kaŝita kaŝaĵo! Maldekstre: Kiel ĝi aspektas al ne ludantoj. Dekstre: Kiel ĝi aspektas kiam trovita. La supro restas per magnetoj.





Maldekstre: Pordo de preĝejo. Meze: Tio ne estas okulo; tio estas eta kaŝaĵo! Dekstre: Spureblaĵo kiu tramonde vojaĝis pli ol 40,000km.

sistemoj, ĉifrado, malmodernaj navigaj teknikoj, aŭ preskaŭ io ajn alia imagebla.

Teraj kaj virtualaj kaŝaĵoj ne havas fizikan ujon por trovi, sed ili gvidas la ludanton al loko kie oni devas respondi al kelkaj demandoj aŭ preni foton por pruvi ke oni ĉeestis. Teraj kaŝaĵoj estas metitaj en geologie interesaj lokoj kaj kutime estas tre informplenaj.

La lasta speco de kaŝaĵo estas okazaĵa kaŝaĵo, dum kiuj geokaŝantoj, kiuj kutime ludas sole aŭ en malgrandaj grupoj, kunvenas en pli grandaj grupoj por babili pri la ludo kaj interŝanĝi ludpecojn, kiuj estas konataj kiel spureblaĵoj. Spureblaĵoj estas aŭ metalaj disketoj aŭ metalaj etiketoj alkroĉitaj al malgranda objekto. Ili ĉiuj havas unikan nombron kaj unikan celon, kaj estas lasitaj de ludantoj en kaŝaĵo. La sekvantaj ludantoj trovas kaj prenas la spureblaĵon, kaj movas ĝin al alia kaŝaĵo, kaj alia, kaj tiel ili ofte ĉirkaŭiras la mondon, fotataj

kaj registrataj survoje.

Estas pli ol 2,500,000 geokaŝaĵoj kaŝitaj ĉirkaŭ la mondo, do oni neniam estas tre malproksime el unu. Kiam Peter kaj mi vojaĝis tra Anglujo, ni ofte ne planis multe da tio kion ni volis vidi, kaj anstataŭe permesis geokaŝaĵojn gvidi nin



Trovis ĝin! Mi subskribas la registrolibron.

al la plej interesaj lokoj. Tiel ni trovis kampon plenan de sovaĝaj hiacintoj, sekvis la piedpaŝojn de la skota poeto Robert Burns, prenis promenon turneon de malgranda ŝafbierna vilaĝo kaj lernis pri ĝia historio, kaj trovis la plej belan preĝejon eniron kiun mi iam ajn vidis.

Mia venonta paŝo estas krei mian propran kaŝaĵon - sendube misteran kaŝaĵon kiu postulos ke oni lernu pri nia amata lingvo!

Lernu pli ĉe www.geocaching.com

* TLS = tutmonda loktrova sistemo (GPS en la angla)



Geokaŝado eĉ okazas en kosmo! Ĉi tie astronauto Rick Mastracchio montras sian spureblaĵon

Sovaĝaj hiacintoj





Teofilo "Teo" JOSE MARIA DE JESUS
Dilio, Orienta Timoro



Indrani BEHARRY-LALL
Adelajdo, Aŭstralio

Kion vi ŝatas pri via loĝloko?

La vetero, homoj, maro, montetoj, manĝaĵoj (kiujn mi preferas).

Kia estas la mondo kiun vi imagas?

Mi imagas mondon kiu estas trankvila, en harmonio kaj paco inter homoj. Ankaŭ la ekosistemo (arbaro, maro, aero ktp.) estu pura.

Kian laboron vi deziris havi kiam vi estis infano?

Mi deziris labori en la nacia asembleo, kaj esti prezidanto, kaj multaj aliaj aferoj kiuj rilatas al nacio.

Kio plej timigas vin en la nuna mondo?

La milito inter unu lando kaj aliaj, ebolo, eksterteraj civilizacioj, nuklea akcidento, kaj multaj aliaj aferoj.

Kiel juna kreskanto, kiun vi admiris?

José Ramos Horta, kiu reprezentis Orientan Timoron en la ĝenerala asembleo (1975) pri la aferoj kaj la milito en nia lando, kaj Nicolau Lobato (politikisto kaj heroo el Orienta Timoro).

ESK | paĝo 22 | 118 | marto 2015

Kia estas la mondo, kiun vi imagas?

Sufiĉaj manĝaĵoj por ĉiuj. Sekura loĝloko kaj tiom multe da amo kaj feliĉo kiom personoj volas por si mem.

Kian laboron vi deziris havi kiam vi estis infano?

Antropologo.

Kio nuntempe estas plej grava en via vivo?

Amikeco kun sampensantaj personoj. Prizorgado de la medio kaj de sovaĝaj bestoj. Labori por plibonigi pacon en nia mondo - Esperanto estas unu el la vojoj.

En kiu lando vi ŝatus loĝi dum unu jaro, se vi havus la ŝancon?

En Aŭstralio! Do alia ŝtato - mi estas en Suda Aŭstralio. Mi ŝatus esplori Tasmanion, Kvinslandon, kaj Okcidentan Aŭstralion.

Kio plej timigas vin en la nuna mondo?

Estas tro da ni. La egoismo de multaj gravaj personoj (politikistoj, riĉuloj k.a.). Gravas ke ni devas pensi pri kion doni anstataŭ ricevi.



Malantaŭa vico, maldekstre al dekstre: Stephen Pitney, Teofilo de Jesus, Kam Lee, Richard Newsum, Jabbar Mohammad, Jacob Sacher, Jonathan Cooper, Yvan Serve, Hazel Green, Paul Green, Peter Johns, Ilia Dewi, Michael Carney, Steven Garamy.

Meza vico: John Fleming, Charles Stevenson, Jennifer Bishop, Mei Springer, Hyon-Suk Li, Maruška Strumiňská, Ken Rolls, Bradley McDonald, Trish O'Connor, Erin McGifford, Pamela Fenton, Trevor Steele, Jean Huelsbeck, Daniel Kane, Rae Watson, John Calder, Marja Nielsen.

Antaŭa vico: Margaret Chaldecott, Indrani Beharry-Lall, Heather Heldzingen, Joanne Johns, Sandor Horvath, Roger Springer, Marcel Leereveld, Alan Bishop, Karl Egger, Madelene Carney, Nicole Else.

Kongresanoj ne en la foto: Dorothy Bysouth, Esther Parris, An Deshun, Dmitry Lushnikov, Helen Palmer, Marumi Smith, Gary Smith, Chris Krageloh.

Mia Unua Kongreso

DE PETER JOHNS (MELBURNO)

Mi ĉeestis la kongreson de Esperanto kaj somerkursaron kiu okazis en Melburno ĉe Internacia Domo dum 9 tagoj en januaro. Tiu estis mia unua kongreso, kaj mi ĉeestis ĉar mi volis plibonigi mian Esperanton per lecionoj kaj babilado kun aliaj homoj.

Mi lernas Esperanton por komuniki, kaj mi trovas ke ĝi estas pli grava por mi, je mia nivelo, paroli ol ĉeesti lecionojn, sed la lecionoj ankaŭ estis bonaj. 50 homoj venis el

8 landoj (Aŭstralio, Nov-Zelando, Orienta Timoro, Indonezio, Ĉinio, Ĉeĥio, Nov-Kaledonio, kaj Koreio) kaj, kvankam mi ne provis interparoli kun ĉiuj, tiuj kiujn mi ja interparolis helpis min esti pli komforta kiam mi parolis la lingvon.

Estis tri niveloj de lecionoj (komencantoj, progresintoj kaj spertuloj). Mi ĉeestis la lecionojn por progresintoj. Mi trovis la lecionojn interesaj kaj helpaj en iuj aspektoj, kaj malfacilaj en aliaj.



La enirejo de la kongreso

Sabaton, Nicholas Halls (unu el la produktoroj) prezentis sian filmon “54 Tagoj” en la angla lingvo kun Esperanto-subtekstoj. Ĝi havis psikologian temon, pri grupo de homoj kiuj enŝlosas sin en bunkro pro ĥemia milito. Estis bone vidi lokan aŭstralian filmon kaj plejparte ĉiuj ĝuis ĝin.

Dimanĉon, ni ĝuis prelegon de Ilia el Indonezio, pri ŝia lando kaj kulturo. Ŝi kantis, dancis en tradicia kostumo, kaj ankaŭ donis al ni guston de indoneziaj manĝaĵoj kiujn ŝi kunportis por kundividi. (Ŝia valizo sendube estis tre plena!)

Ni ankaŭ spertis orienta-timoran



Ilia Dewi el Indonezio dancas en tradicia kostumo

vesperon je lundo, prezentita de Teofilo. Li rakontis pri krokodiloj en sia kulturo, kun bildoj, kiujn li mem desegnis. Poste li kantis tradiciajn kantojn per ukulelo kaj gitaro.

Dum la posttagmezoj, mi ĉeestis diversajn interesajn prelegojn pri temoj inkluzive de tertremoj, art-aprezado, biciklado, interlingvistiko, kaj eĉ la progreso de nova angla romano kiu enhavos esperantistajn

Esperantistoj, rigardinte la filmon “54 Tagoj”, staras kun Nicholas Halls (meze, en blanka T-ĉemizo), unu el la produktoroj.





Teofilo de Jesus el Orienta Timoro kantas

karakterojn.

Merkredon, Hyon-Suk Li el Koreio instruis al ni la korean alfabeton kaj kelkajn vortojn, kaj montris al ni belan korean robon nomitan "Hanbok". Poste, ŝi dancis kun helpo de siaj amikinoj, kaj tiam instruis al la plej kuraĝaj kongresanoj kiel danci "Gangham-stilon".

Tiun vesperon ankaŭ okazis debato pri la temo: ĉu sencon havas promesi amon ĝis la morto? Post tio, okazis kvizo de Trevor, sed mi preferis rigardi! Ĉiuj aliaj verŝajne ĝuis ĝin.

Ni tramiris al St Kilda jaŭdan vesperon por espereble vidi pingvenojn. Kvankam mi loĝis en Melburno dum tri jaroj, mi neniam antaŭe vizitis la pingvenojn. Ni atendis inter multaj homoj ĝis sunsubiro (kiu estis belega!) kaj poste vidis kelkajn etajn pingvenojn kiuj kuris trans la sablo al siaj hejmoj

Supre al malsupre: Grupo de kantantoj gviditaj de Alan Bishop; Ilia instruas la komencantojn; Rikardo instruas la progresintojn; Trevor kaj la spertuloj rolas kiel krucmilitistoj; Yvan butikumas ĉe la libroservo



Kelkaj el la prelegantoj; supre maldekstre al malsupre dekstre: Steven Garamy *Nomoj, Landoj, Esperantistoj*; Sandor Horvath *Ŝeroj en Esperanto*; Elin-Maria Evangelista *Esperanto for the Despairing*; Richard Newsum *Bicikla Karavano*; Jennifer Bishop *Ekologia Melburno*; Erin McGifford *Tertremoj en Nov-Zelando*; Marcel Leereveld *Gramatiko*; Jonathan Cooper *Spaco en Arto*; Margaret Chaldecott *Hilelismo*.

inter la rokoj.

Vendredon, ni aŭskultis belajn kantojn de la kantgrupo de Alan, kiu renkontiĝis dum la semajno por provi. Ni ankaŭ rigardis teatraĵon verkitan de Kam pri Esperanto-TV. Hyon-Suk kaj sia amikino prezentis pli da dancoj, korea kaj flamenka.

Post la spektaklo okazis aŭkcio kiu estis distra (pro la sperta gvido de Trevor) kaj sukcesa.

Je la lasta tago ni iris per buso al la ĝardenoj Alfred Nicholls, kie ni piknikis kaj rigardis la belajn ĝardenojn. Ni eĉ vidis anasidojn sur la lago. Poste ni iris al la Sanktejo William Ricketts kie estas argilaj skulptaĵoj de indiĝenaj aŭstralianoj

inter la arboj. Tiu estas tre bela kaj paca loko. Post nia ekskurso ni revenis al Internacia Domo por ĉeesti la finan eventon: tiu estis la bankedo, kie ni ĉiuj babilis, manĝis, trinkis, kantis, kaj estis feliĉaj.

Mi havis bonegan semajnon da lernado, komunikado, kaj amikiĝado. Mi rekomendus la sperton al kaj novaj kaj malnovaj esperantistoj.

Supre maldekstre al malsupre dekstre:

Korea vespero: Hyon-Suk instruas la korean lingvon, dancas flamenke, kaj instruas al grupo kiel danci "gangham-stile".

Trevor gvidas la aŭkcion. Roger donas monon al Maruška dum la aŭkcio. Ili montras sian televidfaman flagon. Skulptaĵo ĉe la ekskurso al la sanktejo de William Rickett.

Esperantistoj ĝuas la ekskurson al la ĝardenoj de Alfred Nicholls.



Keppel Earl Enderby (1926–2015)

DE VERA PAYNE (FLOREAT)



Nia estimata kaj kara Kep, iama prezidanto de UEA kaj de AEA, forpasis la 8-an de januaro. Pro lia agado en la Esperanto-movado, funebras homoj tra la mondo.

Kep naskiĝis la 25-an de junio 1926 en Dubbo NSK kaj tie ĉeestis la elementan kaj altlernejojn. En 1944 la 18-jarulo aliĝis al la aŭstralia flugarmeo (RAF) kiel pilotlernanto (1944-45) kaj sekve ankaŭ flugis helikopterojn ĝis siaj 60aj jaroj. Post la Dua Mondmilito li studis juron ĉe la Universitato de Sidnejo, kaj dum 1950-54 ĉe la Universitato de Londono, kie li poste laboris kiel advokato kaj instruisto.

En 1951, amatora golfludanto Kep partoprenis en la brita "Open" konkurso, kaj sin montris tiom talenta, ke li superis ĉampionojn Kel Nagle kaj Norman Von Nida, ludis kun eminentulo kia Peter Thompson, kaj eĉ dum kelka tempo ŝanceliĝis ĉu iĝi advokato, ĉu profesia golfludanto.

En 1955 li revenis al Aŭstralio kaj praktikis la juron en Sidnejo. Li

translokiĝis al Kanbero en la '60-aj, ekde 1962 kiel universitata preleganto ĉe la Aŭstralia Nacia Universitato. Dum la '50-aj kaj '60-aj, li estis aktiva advokato por civilaj rajtoj; li helpis starigi la NSK-an Konsilantaron por Civilaj Liberecoj – ĉiam por li granda pasio. En 1970, en krombaloto, li elektiĝis laboristpartia parlamentano por la Aŭstralia ĉefteritorio (ACT). En 1972 ĉefministro Gough Whitlam nomis lin la unua Ministro por ACT (poste renomita Kanbero) kaj por la Norda Teritorio.

Kep rapide montris sian kapablon, tenante plurajn ministrecojn. Li respondecis pri aŭstralia produktado kaj poste pri justico. En Februaro 1975 li iĝis ĉefa Juroficiro (Attorney General). Li multe atingis, inkluzive de leĝoj por malkriminaligi kaj aborton kaj samseksemon en ACT, kaj de leĝoj por nuligi eksedziĝkulpulon en Aŭstralio. Laŭ kolegoj, lia parlamenta servado plenis je distingo. Li estis vaste respektita en diversaj politikaj kaj juĝistaj rondoj.

En 1975 la Laborista Partio malsukcesis kaj Kep revenis al la advokataro. De 1982 ĝis sia emeritiĝo en 1992 li estis juĝisto ĉe la Supera Kortumo de NSK. Ĝis 2000 li estris la Revuan Konsilantaron por Gravaj Kulpuloj (Serious Offenders Review Council). Li ĉiam arde advokatis por la bonfarto de malliberuloj, opiniante ke ĝis 80% de malliberuloj en Aŭstralio devus esti liberigataj; laŭ li, enkarcerigi la plimulton da

krimuloj estas ne efike. Tamen, li aplikis la juron ĝuste kaj juste, sed ankaŭ korkonscie. Li prezidis kiel ĉefo de la Libervola Eŭtanazio-Societo de NSK dum 6 jaroj. Li kaj Dorothy arde defendis sian rajton mem fini la propran vivon kiam tiu ne plu restas eltenebla.

Ili translokiĝis de Kanbero al Balmain, ĝuante jakto-veladon, flugojn en malpezaj aviadiloj, legadon kaj... enkondukon al Esperanto. La onklo de Kep estis delegito de UEA; jen la semo de la intereso. Kep eklernis Esperanton en 1987 kun la helpo de aŭstralia diplomato kaj fervora esperantisto, Ralph Harry. Kompreneble, kiel dumviva ĉampiono de homaj rajtoj, civilaj liberecoj kaj la subprematoj, Kep firme kredis ke la internacia lingvo, se parolata tra la tuta mondo, malpliigus inter-homan konflikton. Sendube multaj konsiderus tion romantika ventmuelila alpiko. Sed la koro de Kep, kiel tiu de Zamenhof, celis internacian harmonion tiuvoje. Kep ankaŭ arde legis la verkojn de la anarkista princo Pjotr Kropotkin kaj fervore subtenis la Sennaciecan Asocion Tutmondan.

Kep estis prezidanto de AEA de 1992 ĝis 1997, en kiu jaro li gvidis la organizadon de la 82-a UK en Adelajdo. La sekvan jaron, 1998, oni elektis lin prezidanto de UEA. Li estis membro de la Komitato de UEA dum kvar oficperiodoj 1992-2004, krom prezidanto de la Esperanta Jura Asocio 1996-2002. La *Ondo de Esperanto* proklamis lin Esperantisto de la Jaro 1999. En 2004 li estis elektita membro de la



Kep en la televidprogramo "Whitlam, The Power & The Passion" per afabla permeso de Bombora Film & Music Co.

Honora Patrona Komitato de UEA. Ne surprize, estinte parlamentano, advokato, kaj arda leganto, Kep elstaris en siaj paroladoj kaj verkitaj artikoloj.

Entute rimarkinda homo. Adiaŭ, Kep, sindediĉulo bonhumorplena, kun impertinenteca humurosenco kaj rideto neforgesebla. Niajn plej profundajn kaj sincerajn kondolencojn al Dorothy kaj la familio Enderby.

Kondolencoj

Kep estis grava gvidanto de la Esperanto-movado en Aŭstralio kaj la mondo, kaj tre bona amiko al multaj el ni esperantistoj. Kiam mi unue renkontis lin en Toowoomba (li multe vojaĝis por subteni Esperanton en multaj provincoj) mi apenaŭ parolis Esperanton kaj miris ke estas tiel facile amikiĝi kun la prezidanto de AEA.

Mi fieris ankaŭ pri lia ekster-

Esperanta aktiveco por defendi homajn rajtojn. Estis kortuŝa sperto partopreni la duan Azian kongreson de Esperanto en Hanojo kun pluraj Aŭstralianoj, kune kun Kep. En 1972 Kep estis ministro en la Aŭstralia registraro, kiu haltigis la militon kontraŭ Vietnamujo. En 1999, dum la kongreso, vietnamanoj honorigis Kep, la tiaman prezidanton de UEA.

Kep kaj Doroteo restos en historiaj rakontoj kaj en niaj koroj.

Hazel Green

Mia unua ekscio de Esperanto estis kiam mi aŭdis radiointervjuon kun Kep Enderby ĉe ABC en aviadilo. Li inspiris kaj konvinkis min pri la valoro kaj idealismo de Esperanto. Post kiam mi informis lin pri lia konvertiĝo de mi, li ĉiam pensis pri mi kiel sia speciala disĉiplo.

Steven Pitney

Kvankam mi renkontis Kep nur kelkfoje, mi memoras lin kiel klarpensantan, energioplenan, pozitivan esperantiston. Kaj mi ankaŭ tre simpatiis kun multe da liaj aliaj vidpunktoj (ekz-e pri homaj rajtoj kaj aŭstraliaj aborigenoj) kaj la fakto ke li vere klopodis plibonigi la rilatojn inter UEA kaj SAT.

Sandor Horvath

Kiel politikisto Kep povis vojaĝi senpage al multaj kongresoj por reprezenti Aŭstralion. Pro sia scio kaj kapablo li sukcesis verki por radio 3ZZZ statuton kaj konvinki la estraron akcepti Esperanton inter la pli ol 70 komunumaj lingvoj. Li estis tre afabla sinjoro.

Jennifer Bishop

Mi neniam renkontis Kep sed mi aŭdis iujn liajn mirindajn oratorajojn kaj mirindajn raportojn de li. Ĉiuj en la Esperanto-Ligo de OA, kun mi, esprimos kondolencojn.

Trish O'Connor



La nova estraro de la Aŭstralia Esperanto-Asocio estis elektita dum la kongreso en januaro. Nun la estraro estas (supre maldekstre al sube dekstre): Jonathan Cooper, Esther Parris, Sandor Horvath, Indrani Beharry-Lall, Joanne Johns, Heather Heldzingen, kaj Margaret Chaldecott.

21-a Ekumena Esperanto-Kongreso

68a Kongreso de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) - 65a Kongreso de KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia)
Strasburgo, Francio, 1-8 de septembro 2015
<http://www.ikue.org/kong2015/index.htm>

Kastelo Greziljono en Francio

2015-apr-03/08: Renkontiĝo de Interkant' kaj kunkantado kun La Kompanoj

2015-apr-17/25: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Zs. Korody, Ch. Chazarein, M. Quenut
2015-apr-25/26: PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1)

Vidu rete <http://gresillon.org/printempas>

2015-jul-20/25: Reĝaj ekskursoj, UK-antaŭkongreso - vidu rete <http://gresillon.org/s2>

2015-aŭg-01/08: Lingva semajno, Lingvofestivaletto, tuj post UK - vidu rete <http://gresillon.org/s3>

2015-aŭg-08/16: Festa semajno por infanoj kaj familioj - vidu rete <http://gresillon.org/s4>

2015-oktobro: AŬTUNE, lingva seminario kun Christian Rivière k.a.

Jara agendo / kalendaro en <http://gresillon.org/agendo>
Por la aŭgustaj semajnoj aŭ poste, ni bonvenigas viajn proponojn por instrui vian lingvon aŭ Esperanton, por prelegi / konferenci aŭ por animi aktivajn por infanoj. Skribu al bertox@free.fr.



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Bradley McDonald | President

Ivan Pivac | Vice-President

David Ryan | Treasurer

Committee Members:

Erin McGifford, Chris Krageloh, Rouan
van Ryn, David Dewar

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President

Jonathan Cooper | Vice-President

Heather Heldzingen | Treasurer

Esther Parris | Secretary

Committee Members:

Margaret Chaldecott, Joanne Johns,
Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



100^a Universala Kongreso de Esperanto

Lillo (Lille), Francio

25 julio – 1 aŭgusto 2015

Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj

De la unua... ek al la centa!



esperanto
France

www.lille2015.fr

